

# LA ANĜEVA FOLIO

LA FEUILLE ANGEVINE



En page 8  
**Les cours  
d'espéranto  
à Angers**

# Esperanto tra la mondo

## Kiam, kie, kio okazas ?

La Internacia Kalendaro listigas ĉiujn konatajn Esperanto-renkontiĝojn, kongresojn, festivalojn, kiuj akceptas vojaĝantajn Esperantistojn kiel partoprenantojn.

Vojaĝu al Esperantaj renkontiĝoj ! Serĉu kaj trovu simpatiajn aranĝojn, kun datoj, nomoj, mallongaj priskriboj, retejaj adresoj, ktp... Se mankas iu aranĝo, anoncu kaj registru ĝin senpage! Diskonigu, reklamu la Kalendaron al viaj Esperantistaj amikoj.

### Jubileo - 20 laborjaroj.

La Internacia Kalendaro ĉi-jare festas sian 20-an jubileon. Ĝi komencis en 1996 kiel memstara rubriko en la gazeto Eventoj, kaj ekde tiam ĝi aperas seninterrompe, jam de 20 jaroj. La Kalendaron funkciigas teamo de la Esperanto-Centro Eventoj en Budapeŝto.

Adreso de la Internacia Esperanto-Kalendaro :

<http://www.eventoj.hu/>

Se vi ŝatus esti kunlabora membro en nia teamo, kontaktu nin:

Szilvási László, szilvasi@eventoj.hu

Bonan vojaĝon, agrablajn travivaĵojn!



Fonte: Ret-Info / Lingvo-Studio, LS

## Quand, où, quoi ?

Le calendrier international liste les rencontres, congrès, festivals espérantistes, qui reçoivent des voyageurs espérantistes en tant que participants.

Participez à des rencontres d'espéranto ! Cherchez et trouvez des événements sympathiques, avec dates, noms, courtes descriptions, adresses internet, etc...

S'il manque un événement, annoncez-le et enregistrez-le gratuitement !

Faites connaître et recommandez le calendrier à vos amis espérantistes.

### Le jubilé - 20 ans de travail.

Cette année, le calendrier international fête son 20ème anniversaire. Il a été lancé en 1996 comme rubrique indépendante dans le magazine Eventoj et depuis, ces 20 dernières années, il paraît sans interruption. Une équipe du centre espérantiste Eventoj de Budapest le fait fonctionner.

Adresse : <http://www.eventoj.hu/>

Si vous souhaitez être membre collaborateur de notre équipe, contactez-nous à : szilvasi@eventoj.hu

Bon voyage, agréables expériences !

Source: Ret-Info / Lingvo-Studio, LS

## Mondo-mapo pri esperantistoj

Lastatempe mi kreis la retejon [esperantujo.directory](http://esperantujo.directory)

Ĝi estas simpla mondo-mapo de Esperantistoj. Mi kreis ĝin por montri, ke estas Esperantistoj ĉie en la mondo, kaj ke Esperanto ja estas vivanta lingvo.

Do, bonvolu registriĝi, alŝuti foton pri vi, kaj ni plenigu la mapon per amikaj vizaĝoj. Espereble ĝi helpos novajn Esperantistojn trovi sin reciproke.

Martin Rue (En la FB-grupo "Espéranto")

*Ndlr: La mapo povas esti impresa ilo por montri kaj pruvi la realan disvastiĝon de Esperanto-parolantoj. Por tio estas necese, ke registriĝu Esperantistoj ankaŭ el malgrandaj, foraj kaj neeŭropaj landoj. Dankojn pro via eventuala helpo en tiu tereno. - L.S..*

Fonte: Ret-Info, LS



## La carte du monde des espérantistes

J'ai récemment créé le site [esperantujo.directory](http://esperantujo.directory)

C'est une simple carte du monde des espérantophones. Je l'ai créée pour montrer qu'il y a des espérantophones partout dans le monde et que l'espéranto est vraiment une langue vivante.

Donc, inscrivez-vous, téléchargez une photo de vous, et nous remplirons la carte de visages amicaux. Espérons que cela aidera de nouveaux espérantophones à se rencontrer.

Martin Rue (du groupe Facebook "Espéranto")

*Ndlr: La carte peut être un outil impressionnant pour montrer et prouver le vrai développement des locuteurs espérantophones. Pour cela, il est nécessaire que les espérantophones s'enregistrent, même venant de petits et lointains pays hors d'Europe. Merci pour votre aide éventuelle. - L.S..*

Source: Ret-Info, LS

# Vizito de Abduraĥman Junusov, Esperantisto el Dagestano



al multnombraj etnoj (40 lingvoj!) kaj estas preskaŭ ekskluzive islamanoj. Ni vidis tre belajn bildojn kaj grandiozajn pejzaĝojn. Tamen, dagestana tradicio ŝokis nin: por akcepti gaston, oni kutime buĉas ŝafon; terure...

Por konkludi nian renkontiĝon, ni preferis tintigi la glasojn kaj dividi kukon kaj frandaĵojn!

Geneviève

## Visite de Abduraĥman Junusov, espérantophone dagestanais

En juin dernier, Espéranto-Angers a accueilli, pendant sa tournée en France, Abduraĥman Junusov, du Daghestan. Accompagné de Laurent, il a bien entendu visité Angers et les fameuses tapisseries du château.

Après un dîner au restaurant où nous avons pu apprécier l'humour de notre invité, celui-ci présenta une conférence et un diaporama sur la géographie, l'histoire et la vie actuelle de son pays.

Le Daghestan (de "Dag" qui signifie "montagne" et de "Stan" qui signifie "pays") appartient à la fédération de Russie. C'est un pays de montagnes, un paradis pour les yeux, mais qui stratégiquement se situe entre des pays envahisseurs et a subi de nombreuses guerres dans son histoire. Du reste, les dagestaniens ont construit jadis de nombreuses tours de guet pour se protéger des ennemis.

La capitale Makhatchkala, située le long de la mer Caspienne, compte 578 000 habitants et le reste des presque 3 millions de dagestaniens se répartit dans ce pays très montagneux. La population est presque exclusivement musulmane et appartient à de nombreuses ethnies (40 langues!). Nous avons vu de très belles images et des paysages grandioses. Cependant, une tradition du Daghestan nous a choqués: pour accueillir un invité, il est de coutume de saigner un mouton; effroyable...

Et pour conclure notre rencontre, nous avons préféré faire tinter les verres et partager gâteau et friandises!

Geneviève



Abduraĥman Junusov kun parto de la publiko

En junio, Espéranto-Angers akceptis, dum lia turneo en Francio, Abduraĥman Junusov el Dagestano.

Akompanate de Laurent, li vizitis Angers, la kastelon kaj ĝiajn famkonatajn murtapiŝojn. Ni restoracie vespermanĝis kaj vere ŝatis la humuron de nia gasto. Li prelegis kaj prezentis lumbildaron pri geografio, historio, kaj vivo de sia lando. Dagestano (de "Dag" kiu signifas "montaro" kaj "Stan" kiu signifas "lando") apartenas al la federacio de Rusio. Ĝi estas montara lando, paradizo por la okuloj, sed strategie situas inter invademaj landoj kaj trafiĝis de multaj militoj en sia historio. Pro tio, Dagestanoj iam konstruis multajn signalturojn por antaŭmalhelpi malamikojn.

La ĉefurbo Maĥaĉkala, kiu situas ĉe la Kaspia maro, nombras 578 000 loĝantojn el la 3 milionoj da dagestanoj. Ili apartenas

## MONA HUMURO

- Mia karulo, estas katastrofo, ni ne povos nun geedziĝi. Imagu, ke mia patro ne plu havas monon. Li perdis sian tutan havaĵon je pokero.
- Ne gravas, mia karulino, ni tamen geedziĝos, ĉar lian havaĵon gajnis mi.

- Iu ulo vizitas sian plej bonan amikon.
- Mi vetas kun vi 50 eŭrojn, ke vi ne divenos kial mi vizitas vin.
- Ho, tute certe, por peti de mi monon, mi ja konas vin.
- Tute ne, mi venis nur por saluti vin. Do, ĉar vi perdis, donu la 50 eŭrojn.

- Mi suspektas, ke vi forgesis, ke vi ŝuldas al mi 100 eŭrojn.
- Se vi scius la grandajn klopodojn, kiujn mi konstante faras por eviti nian renkontiĝon, vi ne dirus tion.

- Kiel vi sukcesas naĝi, konservante tiel longe la kapon sub la akvonivelo?
- Ho, simple, mi libertempis ĉe la marbordo. Kaj en la sama loko, libertempis pluraj el miaj kreditoroj.

## Kunprovkantado en Le Mans

La 29-an de junio okazis en Le Mans kunprovkantado. Famo el la grupo "La Kompanoj", akompanate de du aliaj muzikistoj, gvidis grupon de kantŝatemulojn dum la tuta tago.

Tiu renkonto celis la preparadon de du eventoj:

- La eŭropa festivalo de Châtillon-sur-Indre, kiu okazis de la 13-a ĝis la 16-a de julio, kadre de la nacia festo kaj interkultura dialogo. Venis 220 personoj el 17 eŭropaj landoj. Unuafoje, la Esperanta movado partoprenis.

- La 20-a datreveno de Esperanto-Vendée



kiu okazis la 24-an de septembro, en La Roche-sur-Yon.

## Répétitions de chants au Mans

Le 29 juin dernier a eu lieu au Mans une répétition de chants. Famo de "La Kompanoj", accompagné de deux autres musiciens, a guidé durant toute la journée un groupe de chanteurs amateurs.

Le but était de préparer deux événements :

- Le festival européen de Châtillon-sur-Indre qui s'est déroulé du 13 au 16 juillet dans le cadre de la fête nationale et du dialogue interculturel. 220 personnes de 17 pays européens sont venues. Pour la première fois, l'espéranto y était présent.

- Le 20ème anniversaire d'Espéranto-Vendée qui a eu lieu le 24 septembre à La Roche-sur-Yon.

## "Festanta Planedo" en Mayenne

Laurent, Christine, Philippe kaj Ghislaine deĵoris ĉe la Esperanta-budo dum tiu ekologia festo kiu, nun-jare, okazis en "Brecé" (en departemento Mayenne). Malkiel lastan jaron, la vetero ne estis tre bona. La publiko estis iomete "timema". Tamen, kelkaj kontaktoj estis registritaj kaj kalendaroj disdonitaj.



## "Planete en fête" en Mayenne

Laurent, Christine, Philippe et Ghislaine étaient présents au stand "Espéranto" pendant cette fête écologique qui, cette année, se déroulait à Brecé en Mayenne. Contrairement à l'année passée, la météo n'était pas très bonne. Le public était plutôt "timide". Cependant, quelques contacts ont été enregistrés et des calendriers distribués.

## Miaj spertoj en Esperantujo

Aŭdante pri Esperanto en 2000, dum geografia kurso, mi revis pri alia mondo...

Nur en 2010, mi kaj mia frato Davĉjo komencis lerni la lingvon per la libreto "Assimil". Ni amuziĝis, je la komenco, per la frazoj, kiaj "la salon mi petas". Ni trovis tion nur amuze kaj poste ni seriozigis la lernadon per la retejo "lernu.net". Kun Ana Pasma, ni lernis multe kaj komencis partopreni festivalojn.

Mi partoprenis mian unuan festivalon en 2013 kun "Festo", kiu okazis en Ĵuraso. Tie, mi partoprenis amuzajn atelierojn, kiel kuiri suŝiojn; bani sin kun aliuoloj en lago, promeni en la arbaro kaj perdiĝi. Vespere, ni babilis dum horoj ĉirkaŭ fajro, rigardante stelojn kaj revumante pri alia mondo, bazita sur amo kaj paco kaj libereco...

En la sama jaro mi ankaŭ partoprenis "JES" en Naŭmburgo (Germanio) kun mia frato. Tie, mi lernis la renesancan dancon, reggatonan dancon, trikadon

kaj multajn aliajn aferojn. Ankaŭ, en tiu festivalo, ĉiunokte ni plezuris ĉe agrablaj koncertoj kaj babiladoj en la trinkejo...

Ni vizitis Germanujon okaze de tiu vojaĝo.

Ĉiufoje, kiam mi ie loĝis, mi partoprenis la lernadon en la lokaj kluboj. Tiel mi faris en Diĵono, Sankt-Afriko, Arieĝo kaj Anĝevo; kaj en Sankt-Afriko, mi kreis klubon el kvar homoj. Ni komencis kune muziki kaj kanti. La klubo ankoraŭ ekzistas.

Je la komenco, Esperanto por mi estis nur iu lingvo kaj mi ne partoprenis la movadon, malgraŭ mia estimo por la Esperanta humaneco.

Hodiaŭ, Esperanto por mi estas kara kaj grava kaj, ju pli mi konas tiun lingvon, des pli mi ŝatas la unuecon de la movado kaj la ĉefideon de Zamenhof por proksimigi homojn.

Esperantujo estas mia lando, Esperanto mia familio.

Paŭlino

## Mes expériences en Espérantie

Entendant parler de l'espéranto en 2000 pendant un cours de géographie, j'ai rêvé d'un autre monde...

Ce n'est qu'en 2010 que mon frère David et moi avons commencé à apprendre la langue avec le petit livre de la méthode Assimil. Au début, nous nous amusions avec des phrases comme "la salon mi petas" (le sel, s'il te plaît). Nous trouvions cela amusant et, par la suite, nous avons sérieusement étudié avec le site internet lernu.net. Nous avons beaucoup appris avec Ana Pasma et avons commencé à participer à des festivals.

Mon premier festival fut "Festo" à Métabief dans le Jura en 2013. Là, j'ai participé à des ateliers amusants comme faire des sushis, se baigner dans un lac ou se promener puis se perdre dans la forêt... Le soir, nous bavardions pendant des heures autour d'un feu, en regardant les étoiles et en rêvant d'un autre monde basé sur l'amour, la paix et la liberté.

Cette même année, j'ai aussi participé à "JES" à Naumburg en Allemagne avec mon frère. Là, j'ai appris la danse de la Renaissance, le Raggaetone, le tricot et plein d'autres choses. Chaque soirée, nous prenions plaisir à écouter d'agréables concerts (la Perdita Generacio, Ĝele, JoMo, Johnny M, ...) et à bavarder à la buvette. À l'occasion de ce voyage nous avons visité l'Allemagne.

Chaque fois que j'ai vécu quelque part, j'ai participé au club local. Ainsi à Dijon, Saint-Affrique, Ariège et Angers. À Saint-Affrique, j'ai créé un club composé de 4 personnes et nous avons commencé à jouer de la musique et chanter. Ce club existe encore aujourd'hui.

Au début, l'espéranto n'était pour moi qu'une langue et je ne participais pas au mouvement malgré la hauteur d'esprit de l'espéranto.

Aujourd'hui l'espéranto m'est cher et important. Plus je connais cette langue, plus j'aime l'unité du mouvement et l'idée première de Zamenhof de faire rapprocher les êtres humains les uns des autres. L'Espérantie est ma patrie, l'espéranto ma famille.

Pauline

# Ampleksigu vian vortprovizon !



**Ĉu vi bezonas vortojn aŭ esprimojn teknikajn?**

**Helpe de la Teknika Vortaro de Greziljono, vi povas riĉigi la vortprovizon, kiu ofte mankas en la teknikaj kampoj.**

**Frédéric Lauriol, anĝeva aŭtoro de tiu verko, laboris plurajn jarojn por traduki la nomojn de la diversaj iloj kaj materialoj, kiujn ni uzas por, ekzemple, konstrui domon, ripari biciklon aŭ aŭton, ĝardeni, ktp...**

**Bele ilustrita, ĝi estas ambaŭdirekta, de Esperanto al la franca lingvo kaj inverse.**

## Enrichissez votre vocabulaire !

*Avez-vous besoin de mots ou d'expressions techniques ?*

*À l'aide du Dictionnaire Technique de Grésillon, vous pouvez enrichir le vocabulaire qui manque souvent dans le domaine technique. Frédéric Lauriol, auteur angevin de cet ouvrage, a travaillé plusieurs années à traduire les noms des divers outils et matériaux qu'on utilise pour, par exemple, construire une maison, réparer un vélo ou une auto, jardiner, etc... Joliment illustré, il est en espéranto-français et inversement.*



La Teknika Vortaro de Greziljono estas disponebla (18€ + sendokosto) je tiuj adresoj :  
- SAT-Amikaro - 132-134, bd. Vincent Auriol - 75013 Paris  
libroservo@sat-amikaro.org  
- Esperanto-Angers - info@esperanto-angers.fr  
Ĝi estas ankaŭ konsultebla en Interreto. Jen la ligilo : [gresillon.org](http://gresillon.org)

Le Dictionnaire Technique de Grésillon est disponible (18€ + port) à ces adresses :  
- SAT-Amikaro - 132-134, bd. Vincent Auriol - 75013 Paris - France  
libroservo@sat-amikaro.org  
- Esperanto-Angers - info@esperanto-angers.fr  
Il est aussi consultable sur internet, dont voici le lien : [gresillon.org](http://gresillon.org)

## Demandoj al... Georges Kersaudy

Georges Kersaudy (1921-2015) estis poligloto prefere ol lingvisto. Li havis pasion por lingvoj kaj aŭtoris verkon mirindan pro eruditeco : « Lingvoj sen bariloj » (385 p., Autrement), kiu forportas nin al malkovro de eŭropaj lingvoj. Jen intervjuo de Georges Kersaudy publikigita en "l'Express" en 2001.

### - Kiom da lingvoj entenas Eŭropo ?

GK. Pli ol centon. Kelkaj estas parolataj de 100 milionoj de personoj aŭ pli, aliaj de 50 000 aŭ malpli. Mi elektis naŭdek el ili, sed reale mi pli insistas pri sesdek el ili.

### - El kie ili venas ?

GK. Naŭ eŭropanoj el dek parolas lingvojn, kiuj apartenas al la hindeŭropa lingvaro. En tiu granda familio, tri ĉefaj grupoj reliefiĝas:

- la latinidaj lingvoj, el kiuj la franca, la hispana, la itala, la portugala, la rumana, la kataluna

- la ĝermanaj lingvoj, el kiuj la germana, la angla, la nederlanda, la skandinavaj, la islanda

- kaj la slavaj lingvoj, el kiuj la rusa, la ukraina, la pola, la ĉeĥa...

### - Kiuj estis tiuj indo-eŭropanoj ?

GK. Estas la nomo donita al popoloj, kiuj estus alvenintaj en Eŭropon antaŭ pli ol kvar jarmiloj. Ili venis el Kaŭkazo, el Irano kaj el norda Barato. En nia kontinento, nur kelkaj malmultaj lingvoj, kiujn parolis etaj popoloj rifuĝintaj en siaj montaroj, postvivis tiun lingvan tajdon. Oni tiel distingas okcidente la eŭskan, kaj en Kaŭkazo 36 lingvojn, el kiuj la kartvela estas la plej grava. Je la komenco de sia historio, tiuj indo-eŭropaj lingvoj estis tre proksimaj unu al alia. Ili diferenciĝis dum la lastaj kvar mil jaroj por rezulti la lingvojn, kiujn ni konas hodiaŭ.

### - Vi asertas tamen ke ili estas tre proksimaj inter si...

GK. Jes. Precipe ĉar iliaj leksikoj estas samdevenaj. Plie, la lingvoj senĉese pruntas unu de la alia. Vidu ekzemple la



vorton "bijou". Ĝi devenas de la bretona "biz" (fingro) kiu iĝis "bizou", tio kion oni metas ĉe la fingro. En la dialekto de Vannes, tiu vorto skribiĝas kaj prononciĝas "bijou". Poste ĝi transiris el la franca al multaj aliaj lingvoj. "bijouterie" en la rumana "bijuterie" kaj en la pola "bizuteria".

### - Kial francoj suferas pro lernado de aliaj lingvoj ?

GK. Estas miskompreno ekde la komenco : la nocio de strebo. Oni devas ne strebi por lerni lingvon. Aparte por Francoj. Dum jarcentoj nia lingvo eniris la aliajn lingvojn mirinde. Ni povas facile lerni ne nur la aliajn latinidajn lingvojn, sed ankaŭ la anglan, kies leksiko entenas ĉefe francdevenajn vortojn. Same por la rusa, en kiu kvardek procentoj de la vortoj devenas el la franca. Jen tio, kion oni trovas malferminte rusan vortaron: « abajour, abrikos, chef, absurd... » Sufiĉas lerni la cirilan alfabeton por konstati tion. Nu, tiu alfabeto estas nur varianto de la greka alfabeto. Cetere, hodiaŭ, la Grekoj kaj la Slavoj perfekte konas niajn literojn. Kial ni ne lernu iliajn literojn ekde infanaĝo ?

### - Vi estas konvinkita Esperantisto...

GK. Jes ja. Tri cent jarojn antaŭe, la eŭropaj kleruloj korespondis inter si per la latina. Post la forlaso de tiu lingvo, ne plu estas komuna lingvo por la Eŭropanoj. Esperanto estas tre simpla lingvo. Oni povas konsideri ĝin, kiel modernan latinan lingvon. Dek milionoj da homoj tra la mondo uzas tiun lingvon. Ekzistas abunda literaturo Esperantista kaj dek miloj da tradukitaj verkoj. En 1984, Unesco rekomendis Esperanton en la kampo de sciencaj interŝanĝoj. En mia libro, mi dediĉas kelkajn paĝojn al lernado de Esperanto. Estis la plej bona respondo al tiuj kontraŭuloj, kiuj plejofte ne konas eĉ ununuran vorton el ĝi.

## Questions à... Georges Kersaudy

Georges Kersaudy (1921-2015) fut polyglotte plutôt que linguiste. Ce passionné des langues signe un ouvrage époustouffant d'érudition (Langues sans frontières, 385 p., Autrement), qui nous entraîne à la découverte des langues de l'Europe.

### Combien l'Europe compte-t-elle de langues ?

G.K. Plus d'une centaine. Certaines sont parlées par 100 millions de personnes ou plus, d'autres par 50 000 ou moins. J'en ai retenu quatre-vingt-dix mais je m'attarde réellement sur soixante d'entre elles.

### D'où viennent-elles ?

G.K. Neuf Européens sur dix parlent des langues appartenant à l'indo-européen. Parmi cette grande famille se détachent trois groupes principaux: les langues romanes - dont le français, l'espagnol, l'italien, le portugais, le roumain, le catalan -, les langues germaniques - dont l'allemand, l'anglais, le néerlandais, les langues scandinaves, l'islandais - et les langues slaves - dont le russe, l'ukrainien, le polonais, le tchèque...

### Qui étaient ces Indo-Européens ?

G.K. C'est le nom que l'on donne à des peuplades qui seraient arrivées en Europe il y a plus de quatre millénaires. Elles venaient du Caucase, de l'Iran et du nord de l'Inde. Sur notre continent, seules ont survécu à cette marée linguistique quelques rares langues parlées par de petits peuples retranchés dans leurs montagnes. On distingue ainsi à l'ouest le basque, et dans le Caucase trente-six langues dont le géorgien est la plus importante. Au début de leur histoire, ces langues indo-européennes étaient très proches les unes des autres. Elles se sont différenciées au cours des quatre derniers millénaires pour aboutir aux langues que nous connaissons aujourd'hui.

### Vous affirmez pourtant qu'elles demeurent très proches les unes des autres...

G.K. Oui. D'abord parce que leurs lexiques ont la même origine. Et puis, les langues ne cessent d'emprunter les unes aux autres. Prenez l'exemple du mot "bijou". Il vient du breton biz - "doigt" -, qui a donné "bizou" - "ce qu'on met au doigt". En dialecte de Vannes, ce mot s'écrit et se prononce "bijou". Il est ensuite passé du français à bien d'autres langues. "Bijouterie" se dit en roumain "bijuterie" et en polonais "bizuteria".

### Pourquoi les Français ont-ils alors tellement de mal à apprendre d'autres langues ?

G.K. Il y a un malentendu de départ: la notion d'effort. Il ne faut pas faire d'effort pour apprendre une langue. Notamment pour un Français. Au cours des siècles, notre langue a pénétré les autres langues de façon spectaculaire. Nous pouvons facilement apprendre non seulement les autres langues romanes, mais encore l'anglais, dont le lexique est essentiellement composé de mots d'origine française. Même chose pour le russe, dont le vocabulaire provient à 40% du français. Voici ce que l'on trouve en ouvrant un dictionnaire russe: « abajour », « abrikos », « chef », « absurde » ... Il suffit d'apprendre l'alphabet cyrillique pour s'en apercevoir. Or, cet alphabet n'est qu'une variante de l'alphabet grec. D'ailleurs, aujourd'hui, les Grecs et les Slaves connaissent parfaitement nos lettres. Pourquoi n'apprenions-nous pas les leurs, dès le plus jeune âge ?

### Vous êtes un espérantiste convaincu...

G.K. Oui. Il y a encore trois cents ans, les érudits européens correspondaient entre eux en latin. Depuis l'abandon de cette langue, il n'y a plus d'idiome commun aux Européens. L'espéranto est une langue très simple. On peut le considérer comme du « latin moderne ». Dix millions de personnes à travers le monde utilisent cette langue. Il existe une abondante littérature espérantiste et des dizaines de milliers d'ouvrages traduits. En 1984, l'Unesco a recommandé l'espéranto dans le domaine des échanges scientifiques. Dans mon livre, je consacre quelques pages à son apprentissage. C'était la meilleure réponse à apporter à ses adversaires qui bien souvent n'en connaissent pas un seul mot!

## 89-a Kongreso de SAT en Hercbergo, 2016 : Paŝoj al plia tutmondco



Ekskurso al Goslaro

Por ke asocio estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia. Ĉi-jare la kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) havis diversecon de partoprenantoj vere "tutmondan" : el Nepalo, Koreio, Ĉinio, Japanio, Senegalio, Malagasio, Aŭstralio. Entute aliĝis 85 homoj el 21 landoj. La venonta kongreso okazos en Seulo, do unuafoje en Azio.

SAT, kvankam kun klara radikale maldekstra orientiĝo, havas tre malferman supertendencan funkciadon, kiu ebligas, ke ĉiuj anoj povas esprimi proprajn opiniojn kaj prezenti siajn argumentojn sen timi pri cenzurado pro "politika nekorekteco" dum la limoj de la sennaciece proletesperantista kadro de la statuto estas respektataj.

Prezentitaj estis teatraĵo, *La kredito* de Jordi Galcerán, kaj tri muzikaj vesperoj (krom improvizitaj kanto-ludadojn kelkope kaj eksterprograme iniciate de kongresanoj).

El kultura flanko, la kongreso ebligis pere de sia libroservo akiri multajn librojn, T-ĉemizojn kaj aliajn varojn (kiel la DVD pri Esperanto-movado, spektebla laŭ 22 malsamaj lingvoj), kaj ankaŭ malkovri novaĵojn ĉijare eldonitajn de la eldonkooperativo, kiel originala bildstrio, *La Rejnoro laŭ Vagnero*, kreita de Serĝo Sir'.

Tuttaga ekskurso kondukis nin al Hanovro, kaj duontaga al Hercbergo. En tiu "Esperanto-urbo", vizitanto nepre altrafas ĉie Esperanto-rilatajn ŝildojn.

Kunsidis pluraj SAT-frakcioj. La kunvenon de la vegetara frakcio partoprenis kaj frakcianoj kaj scivoluloj. Aŭdiĝis dum la diskuto tuta gamo de motivoj por vegani (etikaj, ekologiaj, sanrilataj), vegetari kaj ĉiomanĝadi (kutimoj de familianoj kaj la tuta socia ĉirkaŭantaro, malcerto pri la sanefiko de vegana manĝmaniero). Montriĝas, ke esperantistoj kaj aparte SAT-anoj estas "fruadoptantoj" de la nun ĉie disvastiĝanta vegana vivmaniero.

Multaj prelego-debatoj rekte-nerekte tuŝis nun neeskapeblan temon : ekologiismon/medi-protektadon. Estis do pritraktitaj : klimato-ŝanĝo kaj kapitalismo ; ekologiaj sekvoj de la multiĝo de la aŭta trafiko en Ĉinio kaj agado de la ŝtato por plibonigi la aerkvaliton ; eblaj scenaroj por verda estonto ; justa komerco ; bestaj rajtoj.

La multeco de temoj ektuŝitaj en la kunvenoj kaj prelegoj respoguliĝas en la kongresa deklaro, en kiu du ĉefaj emfazoj konstatablas : la ekologia damaĝo, notinde la klimata ŝanĝiĝo, sekvanta el la kapitalisma kreskismo, kaj la neceso respekti la rajton de migrantoj kaj rifuĝantoj cirkuli kie ajn en la mondo libere.

Tre taŭga montriĝis la hotelo, kie okazis plejmulto de la kongreso. Nekutime komforte estis havi eblecon senpere rilati kun hotelestro, kiu mem estas esperantisto.

Vito

## 89<sup>e</sup> congrès de SAT à Herzberg, 2016 : "Mondiale" pas que par le nom

Pour qu'une association soit mondiale, il ne suffit pas de la présenter comme telle. Cette année le congrès de SAT (Association Mondiale Anationale de Travailleurs Espérantistes) comptait une diversité de participants véritablement "mondiale" : d'Europe mais aussi du Népal, de Corée, de Chine, du Japon, du Sénégal, de Madagascar, d'Australie. Au total 85 personnes de 21 pays. Le prochain congrès aura lieu pour la première fois en Asie, à Séoul.

SAT, bien qu'ayant une orientation clairement et radicalement de gauche, a un fonctionnement très ouvert et au-dessus des tendances. Ceci permet à tous les membres (mais aussi aux non-membres, dans le cadre de la revue) d'exprimer leurs propres opinions et de présenter leurs arguments sans risquer d'être censurés pour cause de "politiquement incorrect", dans les limites du cadre anational, espérantiste et prolétarien des statuts.

Une pièce de théâtre traduite a été présentée, *Le crédit* de Jordi Galcerán. Trois autres soirées ont été musicales (en plus des moments de musiques-chants improvisés).

Sur le plan culturel également, le congrès permettait, par son service librairie, d'acquiescer de nombreux livres, T-shirts et autres objets (comme le DVD du film "Esperanto"), et aussi de découvrir des nouveautés éditées dans l'année par la coopérative, comme une bande-dessinée originale de Serge Sire, *L'Or du Rhin* (d'après Wagner).

Une excursion s'est déroulée à Hanovre. Une autre à Herzberg a conduit aux lieux remarquables de la "ville de l'espéranto", où un touriste qui visite cette ville ne peut échapper aux nombreux panneaux en rapport avec l'espéranto.

Plusieurs groupements thématiques de SAT ont tenu leurs réunions respectives. A celle de la section végétarienne a été entendu pendant les échanges toute une gamme de motivations pour être végane, végétarien ou omnivore. Il apparaît que les espérantistes et en particulier les membres de SAT sont des pionniers du mode de vie végane qui se développe actuellement partout.

Beaucoup de présentation-débats étaient plus ou moins étroitement en lien avec un thème actuellement incontournable : l'écologie et la protection de l'environnement. Ainsi il a été question de : changement climatique et capitalisme ; conséquences écologiques de l'explosion de la circulation automobile en Chine et action de l'État sur la qualité de l'air ; scénarios possibles pour un futur vert ; commerce équitable ; droits des animaux.

Dans la déclaration du congrès, deux principaux thèmes ressortent : le désordre écologique, découlant du croissancisme capitaliste, et la nécessité de respecter le droit des migrants et des réfugiés à circuler librement où bon leur semble. L'hôtel dans lequel s'est tenu la plupart des temps du congrès s'est montré très adapté. Ce fut un confort notable de pouvoir échanger directement en espéranto avec le patron de l'hôtel.

Vito

# 20-a datreveno de la Esperantaj Pluezekaj Renkontiĝoj kaj 2-a Tutkelta Kongreso

13-a - 20-aŭgusto



Ĝoja etoso dum bretonaj dancoj



Ekskurso en la Valo de Sanktuloj - Carnoët



Kongresanoj antaŭ la kongresejo

"Pipe band" grupo el Saint-Brieuc



"Estu bonvenaj" diris la prezidanto" Jean-Claude Dubois. Jes ja, tio okazis. Li skribis ankaŭ en niaj kongres-libretoj : "Iomete antaŭ la 21a jarcento, kelkaj esperantistoj el Bretonio deziris, kaj plibonigi sian esperantan lingvon, kaj samtempe malkovrigi al aliaj esperantistoj la belan ĉarmon de somera Bretonio. Tial eta esperantista skipo klopodis por organizi vilaĝajn amikajn renkontiĝojn en Pluezek. Tuj la urbestro estis favora al la ideo kaj permesis uzi la vilaĝan festohalon kaj lernejon dum unu semajno, tute senpage. Tiu eta esperantista miraklo daŭras de 20 jaroj" Do, ni travivis tiun miraklon. La fama kelta grupo "pipe band" el Saint-Brieuc multe animis la malferman tagon. Ĉiŝmatene, sep klasĉambroj estis malfermitaj al la kongresanoj por kurs

laŭ la diversaj niveloj; dek infanoj partoprenis. La postagmezoj estis rezervitaj al diversaj ekskursoj (interalie la klifoj, la urbo Paimpol, La Valo de la Sanktuloj en Carnoët, la strando Gwin Zégall kiu estas kuriozaĵo apud Pluha). Ankaŭ, postagmeze, okazis atelieroj : komputiko, teatro, kantoj, joko, keltaj desegnoj, origamo. Ni multe amuziĝis dum la vesperaj aranĝoj. Multe plaĉis la bretonaj dancoj en ĝoja kaj amika etoso, kaj la teatraĵo prezentita de Esperanto Vannes : "Kulpulo en nia festejo". Bedaŭrinde, dramo venis funebrigi tiun belan kunvenon. La ĥorestrino de la koruso Interkant', Zdravka, devis foriri al Bulgario pro la morto de siaj gepatroj en aŭto-akcidento. Estis granda ŝoko por ĉiuj.

Geneviève Gourichon

## 20<sup>e</sup> anniversaire des rencontres espérantistes de Plouézec et 2<sup>e</sup> congrès celtique

13 - 20 août

"Soyez les bienvenus" nous dit le président, Jean-Claude Dubois. Ce fut le cas.

Pour expliquer l'évènement, il écrivit également dans nos livrets de congrès : "Jamais, la poignée d'irréductibles espérantistes bretons à l'origine du projet, n'aurait imaginé que les rencontres internationales de Plouézec attireraient plus de 2000 espérantistes pendant 20 années. Ce fut pourtant le cas, grâce à l'implication de la commune et de nombreux espérantistes bretons qui ont permis de faire découvrir le charme de la Bretagne côtière dans l'ambiance amicale et festive chère au mouvement espérantiste. Ce petit miracle espérantiste dure depuis 20 ans". Eh bien, ce petit miracle, nous l'avons vécu !

Durant la journée d'ouverture, le fameux groupe de musique celtique "pipe band" de St Brieuc, a été fortement présent. Chaque matinée, sept salles de classe étaient ouvertes aux congressistes pour les cours d'espéranto selon les différents niveaux; dix enfants participèrent. Les après-midis étaient réservés aux diverses excursions (entre autres : les falaises, la ville de Paimpol, La Vallée des Saints à Carnoët, la plage Gwin Zégall près de Pluha). Des ateliers étaient également proposés : informatique, théâtre, chant, yoga, dessin celtique, origami. Nous nous sommes beaucoup amusés pendant les soirées. Les danses bretonnes, organisées dans une ambiance joyeuse et amicale, ont beaucoup plu. Une pièce de théâtre fut présentée par Esperanto Vannes : "Kulpulo en nia festejo" (Le coupable est dans la salle !)

Malheureusement, un drame est venu endeuiller cette belle rencontre. Zdravka, chef de chœur d'Interkant' a dû repartir vers la Bulgarie suite à la mort de ses parents dans un accident automobile. Ce fut un grand choc pour tous.

Geneviève Gourichon

# Les cours d'Espéranto à Angers

Bienvenue à tous pour découvrir, apprendre, pratiquer, jouer, et bien plus encore.....



## Niveau 1 bis (intermédiaire)

**Mercredis de 18h30 à 20h**

Salle du Petit Mathurin (droit)  
34, avenue Jean XXIII, La Roseraie, Angers

## Niveau 3 (conversation)

**Vendredis de 18h30 à 20h**

Salle du Petit Mathurin (droit)  
34, avenue Jean XXIII, La Roseraie, Angers

## Nous contacter

### Espéranto-Angers

3 allée du Haras 49100 Angers  
Tél. 02 41 20 19 40 - Courriel : [info@esperanto-angers.fr](mailto:info@esperanto-angers.fr)

## Aparta omaĝo dum Pluezekaj Renkontiĝoj 2016

Krom la omaĝo kiu estis dezirata por danki la bonvolulojn, ni travivis apartan omaĝon al Gaby (Gaby Tréanton). Ŝi estas vigla kaj sperta bretona 96 jaraĝa esperantistino. De longe kaj ankoraŭ nun, ŝi instruas la junulojn kaj infanojn. Brave Gaby kaj dankon ! Por ŝi, Marie-Pierre el St. Brieuc verkis la lastan strofon de sia kansono :

*En kapo la plej juna jes  
Ah ah ah ah ah  
Nomiĝas Gaby vere jes  
Ah ah ah ah ah  
Tuj venis ŝi, tuj venis ŝi  
Junis ni, junas ni,  
Kiel ŝi, junos ni*

(laŭ la melodio de la marista kanto "Les trois marins de Groix")

Spontane kaj amuze, nova verbo rondiras en la esperanta movado : la verbo "gabii" !! (post emociiga diro de Laurent el St. Brieuc)

Geneviève



Gaby kun Marie-Pierre Guyonnet

## Un hommage tout particulier pendant les Rencontres de Plouezec 2016

Outre l'hommage qui avait été fait pour remercier les bénévoles, nous avons vécu celui tout particulier dédié à Gaby (Gaby Tréanton). Bretonne, âgée de 96 ans, elle est une espérantiste active et énergique. Depuis très longtemps et encore à ce jour, elle donne des cours auprès des jeunes et des enfants. Bravo Gaby et merci ! Pour elle, Marie-Pierre de St. Brieuc a écrit le dernier couplet de sa chanson. Spontanément et avec amusement, un nouveau verbe circule dans le mouvement espérantiste : le verbe "gabii" (après un dire plein d'émotion de Laurent de St. Brieuc).

Geneviève

## Oranĝa kuko vegana Gâteau vegan à l'orange

Simpla recepto facile kaj rapide realigebla, kaj taŭga por veganoj.  
Preparaĵo : 20 minutoj  
Kuirado : 30 minutoj

### Ingrediencoj por 8 porcioj :

- Suko de dika oranĝo
- 1 glaso da faruno
- 3/4 glaso da sukero
- 1/4 glaso da figa pulvoro (nedevisa)
- 1/4 ĝis 1/2 glaso da oleo (sunflora ekzemple)
- saketo da gisto
- pinĉpreno da salo

### Preparado :

- Kunmiksi sekaĵojn kaj ŝaltu fornon je 200°C.
- Aldonu likvaĵojn kaj homogenigu.
- Verŝu preparaĵon en bakujon kaj enfornigu dum ĉirkaŭ 30' ĝis plene kuiratas.

Principe la recepto estas planita kun tritika faruno sed facile eblas ĝin fari per senglutena (maiza, kaŝtana...).

Simple recette facile et rapidement réalisable et convenant aux vegans.  
Préparation : 20 minutes  
Cuisson : 30 minutes

### Ingrédients pour 8 portions :

- jus d'une grosse orange
- 1 verre de farine
- 3/4 de verre de sucre
- 1/4 de verre de poudre de figue (pas obligatoire)
- 1/4 à 1/2 verre d'huile (de tournesol par exemple)
- sachet de levure chimique
- 1 pincée de sel

### Préparation

- Mélangez les ingrédients secs
  - Préchauffez le four à 200°
  - Ajoutez les liquides et homogénéisez
  - Versez la préparation dans un plat et enfournez-le pendant environ 30 mn jusqu'à cuisson complète.
- En principe la recette est prévue avec de la farine de blé mais on peut facilement la réaliser avec de la farine sans gluten (maïs, châtaigne...)

Recepto provizita de Vito Markov

■ Gratulojn al la lernantoj de Pierre Jagueneau : Sylvie Medina, Marie-Christine Lemoine kaj ankaŭ al Philippe Lachaux kiuj sukcese trapasis la ekzamenon de la unua nivelo. Ĝi estis organizita de la Centro Kultura Esperanto el Nantes kaj Christian Rivière estis la kunordiganto.

■ Félicitation aux élèves de Pierre Jagueneau : Sylvie Medina, Marie-Christine Lemoine et aussi à Philippe Lachaux, qui ont réussi l'examen du premier niveau en espéranto. Il était organisé par le Centre Culturel Espéranto Nantes et Christian Rivière était le coordinateur.

## Vous informer

### [www.esperanto-angers.fr](http://www.esperanto-angers.fr)

[www.esperanto-france.org](http://www.esperanto-france.org), [www.esperanto-jeunes.org](http://www.esperanto-jeunes.org)  
[www.uea.org](http://www.uea.org), [www.esperanto.net](http://www.esperanto.net)